

HEROLDO DE ESPERANTO -PROTOKOLO DE LA TRANSDONO (1996)

(Traduko el la itala originalo (la substrekoj ne aperas en la originalo))

La 17-an de julio 1996-a, je la 18- horo, je la dua kunvoko, ĉe la jura sidejo en via Sandre 15, Venaria Reale (Torino), kunvenis la Asembleo de la Asocio "Heroldo de Esperanto", por pridiskuti la sekvan tagordon:

- 1) raporto de la prezidanto**
- 2) transigo de proprieto.**

Ĉeestas: Ada Fighiera-Sikorska (redaktorino de la gazeto "Heroldo de Esperanto"), Gian Carlo Fighiera (prezidanto), Ida Chiarovano Ferroglio, Luigi Chiarovano. Neĉeestas pravigita pro malsano Franca Concina.

Konstatinte la eston de la kvorumo, la prezidanto komencas la kunsidon per mallonga raporto pri la agado de la asocio kaj anoncas la decidon sian kaj de s-ino Ada Fighiera-Sikorska definitive ekŝiĝi el la oficoj ĝis nun plenumitaj. La prezidanto proponas daŭrigi la celojn de la asocio pere de la transigo de ĉiuj aktivoj kaj pasivoj al alia societo, kondiĉe ke ĝi pretu solene sindevontigi tiucele kaj precipe garanti la pluekziston de la periodaĵo "Heroldo de Esperanto", respektante kaj daŭrigante ĝiajn tradiciojn kaj principojn sekvatajn ekde 1920-a. Koncerne tion la prezidanto informas la Asembleon pri la kontaktoj, estigitaj laŭ ordono de la Estrara Komitato, kun la Itala Centro de Interlingvistiko, kunligita al la Kooperativo de Literatura Foiro.

Ĉe la sekva punkto, post zorga ekzameno, la Asembleo unuvoĉe decidas jenon:

- 1) aplaŭdo kaj kora dankesprimo estas adresitaj al s-ino Ada Fighiera-Sikorska pro ŝia sindediĉo al la citita periodaĵo. Ŝi redaktis ĝin 36 jarojn sinsekvajn, malatentante sian personan profiton, superante ĉiujn malfacilaĵojn renkontitajn en la tasko;**
- 2) estos baldaŭ ekplenumitaj la necesaj formalizaĵoj por registri d-ron Marco Picasso, enskribitan en la listo de la profesiaj ĵurnalistoj de Lombardio, kiel respondecan direktoron de la periodaĵo ekde la 1-a de januaro 1997-a, anstataŭe de s-ro Aldo de' Giorgi. Komence de la sama dato estos registritaj la nova proprieto kaj la nova administra redaktoro;**
- 3) la gazeto "Heroldo de Esperanto" kaj la koncerna librokolekto estas transdonitaj sen iu ajn financa kondiĉo por ambaŭ kontraktantoj al la asocio Itala Centro de Interlingvistiko, kies jura reprezentanto estas la prezidantino d-rino Tiziana Rogora, loĝanta en Milano; tiu Centro sin devontigas daŭrigi la eldonadon de la gazeto, respektante ties tradiciojn kaj principojn, ek de la 1-a de januaro 1997-a kaj prizorgi ties administradon**

- ek de la 1-a de januaro 1998-a, en ambaŭ kazoj pere de la helpo de la Kooperativo de Literatura Foiro, societo kun jura sidejo en La Chaux-de-Fonds (Svisio): se estontece tiu Centro intencos transdoni la gazeton al alia societo, kiu certigos ĝian pluekziston, la Centro mem sin devontigas ek de nun obei la direktivojn indikitajn en tiu ĉi protokolo, reznante financajn kondiĉojn inter la estontaj kontraktantoj, kaj krome sin devontigas respekti la tradiciojn kaj la nunajn principojn de la gazeto. En la periodo inter la 1-a de januaro 1997-a kaj la 1-a de januaro 1998-a, ges-roj Fighiera pretas daŭrigi la administradon de la gazeto je la nomo kaj por la Centro;
- 4) la transdono prezentita ĉe la punkto 3) inkluzivos neniun ŝuldon, escepte de la malmultaj dumvivaj abonkotizoj, kaj okazos sen kaŭzi malrapidiĝon de la eldonritmo. Kiel konsentite la lasta numero de 1996-a aperos je kosto de la asocio "Heroldo de Esperanto";
 - 5) la librokolekto en Esperanto nuntempe je dispono de la asocio estas transdonita egale, ek de la 1-a de januaro 1997-a, sen iu ajn financa ŝarĝo, al la Centro citita ĉe la punkto 2) je kondiĉo ke ĝi estu utiligata por la redaktaj bezonoj kaj ke ĝi estu konstante riĉigata. Se la Centro transdonos la gazeton al alia societo, la Centro mem transdonos senpage al la nova kontraktanto ankaŭ la tutan librokolekton, sen iu ajn financa postulo.
 - 6) Ĉiuj rajtoj por ĉiuj ne periodaj eldonaĵoj de la asocio estas egale ceditaj al la Centro senpage, ek de la 1-a de januaro 1997-a. Samdate la Centro ekposedos la tutajn eldonitajn kvantojn de la suprecititaj publikaĵoj, kune kun la filmoj pri komposto kaj paĝonumerado pretaj por la reldono, laŭ listo kompilita de la prezidanto Fighiera. La suprecitita transdono de proprieto dependas de la repago fare de la Centro al S-ro Fighiera, laŭ manieroj fiksotaj, de la monsumoj antaŭpagitaj persone de li mem, kaj ankoraŭ ne reakiritaj, por la publikigo de la gramatiko de Broccatelli (2-a eldono) kaj de la gramatiko de Dahlenburg. La valoro de tiu ĉi repago ne superos 9 milionojn da liroj.

La Asembleo decidas ke neniun disvatigu la novaĵon pri la alprenitaj decidoj pli frue ol dato interkonsente fiksota.

La Asembleo nomumas la prezidanton Fighiera sola plenumanto de la alprenitaj dispozicioj, kun komisio, krome, plenuminte ĉiujn decidojn, rekunvoki la Asembleon por decidi ĝian malfondon laŭ la artikolo 12 de la statuto.

Elĉerpinte ĉiujn erojn de la tagordo, oni ĉesigas la Asembleon je la horo 20,30.

Subskriboj:

- . Ada Fighiera-Sikorska
 - . G. C. Fighiera
 - . Luigi Chiarovano
 - . Ida Ferroglio in Chiarovano
-

Postaj klarigoj de G. C. Fighiera:

- 1. Pluraj fundamentaj kondiĉoj de la transdono ne estis respektitaj.**
- 2. La societo Heroldo de Esperanto, historia eldonanto de la samnoma gazeto neniam estis malfondita, sed ĝia estraro estis periode renovigita post la morto de S-ino Fighiera.**
- 3. Pliaj detaloj aperas en la broŝuroj “La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka”, “L.L.Zamenhof, la homo laŭ lia idearo en liaj propraj vortoj”, en pluraj aliaj eldonaĵoj kaj en “Beletra Almanako”.**

G. C. F.

(sendita de G.C. Fighiera)